

James Yorkston,
Molly Malone

*tradukita de Jean-Marc Le-
clercq*

En bela Dublino,
kie ravas la ino,
Ekvidis dolĉegan mi Molly
Malone.
Ŝi travagis stratarojn
puŝante la varojn.
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de
mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn propo-
nas mi!

Estis ŝi vendistino,
sed ne miris Dublino,
Ĉar ankaŭ tiel faris gepatroj
de ŝi.
Ili vagis stratarojn,
puŝante la varojn,
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de
mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn propo-
nas mi!

Jen febro ekfortis,
pro tio ŝi mortis,
La fino alvenis al Molly Ma-
lone.
Fantomo nun vagas,
neniu nun pagas
Por kardioj, miltuloj puŝataj
de ĝi.
Fantomajn kardiojn
Fantomajn mitulojn,
Fantomajn moluskojn nur
vendas nun ĝi.

...

James Yorkston,
Moliino Malon'

tradukita de Manfred Ratislavo

1. En bela Dublino,
Jen vivis knabino,
Enamiĝis unue en tiun ĉi mi.
Ĉareton ŝovante
Tra l' stratoj irante
Ŝi vokis : Jen konkoj, jen ostroj!
Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tut-
freŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi,
ho!

2. Veturis ŝi tiel
Tra l' stratoj samkiel
Ĝin faris antaŭe gepatroj de ŝi.
Sian ĉaron ŝovante,
Tra l' stratoj irante
Vokante : Jen konkoj, jen ostroj!
Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tut-
freŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi,
ho!

3. Ŝi iĝis malsana,
Sanig' estis vana,
Memoras mi ĉiam ankoraŭ pri
ŝi,
Tra l' stratoj iranta,
Ĉareton ŝovanta,
Vokanta: Jen konkoj, jen ostroj!
Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tut-
freŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi,
ho!

...

James Yorkston,
Molly Malone

In Dublin's fair city,
Where girls are so pretty,
I first set my eyes on sweet Mol-
ly Malone,
As she pushed her wheelbarrow
Through streets broad and nar-
row,
Crying, Cockles and mussels,
alive, alive oh!
Alive, alive oh! alive, alive oh!
Crying, Cockles and mussels,
alive, alive oh!

She was a fishmonger,
And sure twas no wonder,
For so were her mother and fa-
ther before,
And they each wheeled their
wheelbarrow,
Through streets broad and nar-
row,
Crying, Cockles and mussels,
alive, alive oh!
Alive, alive oh! alive, alive oh!
Crying, Cockles and mussels,
alive, alive oh!

She died of a fever,
And no one could save her,
And that was the end of sweet
Molly Malone.
Now her ghost wheels her bar-
row,
Through streets broad and nar-
row,
Crying, Cockles and mussels,
alive, alive oh!
Alive, alive oh! alive, alive oh!
Crying, Cockles and mussels,
alive, alive oh!

...

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de JEAN-MARC LECLERCQ (*1961-10-10).*

Arg-374-1886 (2013-11-25 11:01:43)

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-12-04.*

MR-451-2 (Esperanto) / Arg-374-735 (2008-11-29 16:14:27)

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas James Yorkston.

Arg-374-733 (2013-11-25 12:31:14)

Pri la kanto vidu la retejojn <http://homepage.eircom.net/~seanjmurphy/irhismys/molly.htm> kaj <http://homepage.eircom.net/~seanjmurphy/irhismys/mollylyrics.htm>. En la unua retejo estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. Vidu ankaŭ la germanan version de la vikipediejo pri Molly Malone: http://de.wikipedia.org/wiki/Molly_Malone. Legu ankaŭ: http://en.wikisource.org/wiki/Molly_Malone.